# *Díaz-Canel alvokas ne timi la sociajn retojn.*




La unua vicprezidento Miguel Díaz-Canel, alvokis la pedagogojn altigi la instruan kvaliton kaj fortigi la ideologi-politikan laboron.

Dum la seminario sesiinta por prepari la novan lernojaron 2015-2016, Díaz-Canel emfazis la bezonon forigi la instruadon surbaze de memora lernado, tial ke la kuba edukado alfrontas la defion formi la junularon meze konstantaj teknologiaj avancoj kaj la aktualigo de la kuba sociekonomia modelo.

Li insistis pri tio ke oni ne devas timi la sociajn retojn. Estu tiel ke iam ?iuj kubanoj havu profilon en Facebook a? Twitter, ?ar tiamaniere ili povas anka? defendi la realon de Kubo.

Li anka? emfazis ke iom post iom oni sukcesos informatizi la kuban socion, kaj unu el la lokoj unue profitontaj estos la lernejoj, ?ar se la konektebleco kreskas, sed nur uzeblas de tiuj kiuj posedas telefonon a? tableton personan, tiam ampleksi?us la cifereca bre?o en nia lando, kiam nia celo estas ?uste la malo.

Li aldonis ke "oni devas kompreni ke por la nunaj adoltoj tio kio estas sukceso de la Revolucio, por la novaj generacioj estas rajtoj kiujn ili havas; tiam, bezonas klarigi al ili kun kiom da peno oni atingis tion, kiom da sinoferoj oni devis trapasi por tio, sed tio postulas allogan instrumanieron pri fakoj kiel historio kaj marksismo", emfazis la kuba vicprezidento.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/51376-diaz-canel-alvokas-ne-timi-la-sociajn-retojn

**Radio Habana Cuba**